LA PACO — NE REVO, SED TASKO

Kardinalo König, ĉefepiskopo de Vieno, faris en manifestacio okaze de la tutmonda tago de paco 1972, aranĝita de la konstanta reprezentantaro de la Sankta Seĝo ĉe la Internacia Aŭtoritato de Atomenergio kaj ĉe la Internacia Organizo por Evoluigo de la Unuiĝintaj Nacioj, alparoladon pri la temo: « *Se vi volas la pacon, tiam laboru por la justeco* ».
Ni jen prezentas eltiraĵon el la manuskripto de tiu ĉi signifa alparolado:
Paco kaj justeco, tio estas la granda sopiro de la homaro, de kiam ĝi estas veninta al la ekkono pri si mem, Paco kaj justeco estas la granda vizio en la mitoj kaj sanktaj skriboj de la popoloj.
Sed ĉu paco kaj justeco ĉiam devas resti nur revo, sopiro, vizio? Nuntempe la mondo estas alveninta ĉe vojdisiĝo. Kaj ĝi povas, se ĝi volas, se ĝi dediĉas forton, volon kaj komprenemon, fari grandegan paŝon al la realigo de tiu ĉi vizio. Sed ĝi povas ankaŭ perdi kaj malgajni ambaŭ: la pacon kaj la justecon. Sed per tio ankaŭ por ĉiam sian ekzistadon kaj nian vivon.
« Se vi volas la pacon, tiam laboru por la justeco ». Ĉi tiu senco iam tekstis alie. Ankoraŭ ĝi estas legebla sur la frontonoj de kelkaj milit-ministerioj. « Se vi volas la pacon, tiam preparu la militon, si vis pacem para bellum ». Tiamaniere tie estas legeble. Tio estis la « saĝo » de du jarmiloj, kiu uzis ĉi tiun parolon de la romanoj kiel alibion. Nuntempe la militministerioj ne plu nomiĝas militministerioj, sed ministerioj de nacia defendo. Oni ne plu parolas pri milito, sed nur pri defendado. Neniu plu faras militojn, sed ĉiu nur defendas sin kontraŭ atako, kontraŭ agreso, kaj opinias, ke per tiu vortludo ĉio estas permesata. Estas konate, ke ankaŭ la dua mondmilito tiel komenciĝis, ke laŭdire oni « repafis ». Sed la teruraj armiloj, kiuj ankoraŭ nun ĉiam estas produktataj kaj troviĝas en la arsenaloj de la grandpotencoj, por kelkoble eksplodigi la mondon, nenion estas perdintaj de sia teruregо, se oni nomas ilin *defendarmiloj*. Ni staras ĉe vojdisiĝo. Laŭdire la pacon volas ĉiuj. Ili opinias, ke ili sekurigas ĝin, ŝarĝante ĝin per la atom-peziloj de la detruado. La pacon oni ne povas ŝarĝi per teruro, sed oni ankaŭ ne povas atendi, ke ĝi venas de si mem. Kiu volas la pacon, devas ion fari por la paco. La paco ne estas revo, sed tasko. Ne la neagemuloj, la pasivuloj, la al sia sorto sindonemuloj, estas en la surmonta prediko proklamitaj beatuloj, sed la pacigantoj, la pretigantoj de la paco, tiuj, kiuj kreas la pacon, kiuj ion faras por la paco. Sed fari ion por la paco, tio signifas, fari ion kontraŭ

la kaŭzoj de la malpaco. Ĉefkaŭzo de la malpaco en la mondo estas la maljusteco. Labori por la paco tial signifas, labori por la justeco. Justeco estas la fundamento de la paco tiom, ke ĝi malhelpas la tensiojn, kiuj kondukas al milito. Ni nur cirkaŭrigardu momenton en nia senpaca mondo hodiaŭ. Kie ekzistas centroj de krizoj, militaj implikaĵoj, kiuj ne estas en konekso kun manko, retenado de justeco, kun detruado kaj mistraktado de la justeco, ĉu jen temas pri sociala, nacia aŭ rasa justeco, aŭ ankaŭ pri religia, politika aŭ ekonomia justeco?

La justeco estas la fundamento de la paco aŭ, esprimite dinamike, kiu *volas la pacon, devas labori por la justeco.* Sed labori por la justeco, ne signifas, konsideri la kompletan plenumon de absoluta justeco kiel antaŭkondiĉon de la paco. Justeco estas celo, kiun ni volas alstrebi, ideo, kiun ni volas efektivigi, la paco estas tasko, fakto, kiun ni volas atingi aŭ konservi. La justeco estas absoluta idealo, la paco estas relativa fakto. Paco, libereco kaj justeco. Tio estis la granda vizio de la homaro, la revo, kiu estis plu-portita de generacio al generacio. Ni estas komisiitaj, projekcii tiun revon ne en la pasintecon, sed en la estontecon, en estontecon, de homoj faritan. La justeco estas efektivigebla, la paco estas farebla, se ni nur volas. La paco ne estas ideo, ŝvebanta en nuboj, *la paco estas tasko. Dio estas Dio de la paco.* Li volas, ke ni faru ion. Beataj estas tiuj, kiuj kreas la pacon! Ve al ni, se ni ne kapablas pro egoismo, pro malvarma koro, pro senfantaziemo. Ni staras ĉe vojdisiĝo. Sed ni ne plu povas resti longe starantaj.

Tradukis el « Oesterreichisches Klerus-Blatt » N.ro 3/1972

AKLE-Rondo resp. W. M. Wien.

EKLEZIO EN LA MONDO

KARD. ANGELO DELL'ACQUA, vikario de la Papo por la diocezo Romo, pro koratako mortis neatendite en Lourdes, kie li prezidis la diocezan pilgrimgrupon. Matene li estis prezidinta la solenan kuncelebron de la Meso en la baziliko « S. Pio X ». Li estis 69 jara. Oni anoncis tuj lian morton al la episkopo de Lourdes kaj al la Papo.

OLIMPIAJ LUDOJ. En bena mesaĝo sendita al Kard. Döpfner, ĉefepiskopo de Munkeno, Paŭlo VI bondeziris, ke la olimpiaj ludoj, tutmonda renkontiĝo de sportistoj, povu kontribui al la frateco, al la interkompreniĝo kaj al la tutmonda paco. La Papo volis atesti sian intereson por tiuj ludoj sendante al la Munkena Kardinalo hostiujon, el

kiu oni disdonis la sanktan komunion dum la malferma Meso. La hostiujo estos konservata en la kapelo de la olimpia vilaĝo.
La 6-an de septembro estos memorata kiel nigra tago en la historio de la olimpiadoj. La serena atmosfero kaj la paco de la dudeka olimpiado estis detruita neatendite, kiam arabaj teroristoj atakis la israelan teamon. Tiu krimega atako kaŭzis teruran masakron, en kiu 18 homoj perdis sian vivon: 5 arabaj teroristoj, 11 israelaj atletoj, 1 germana policisto kaj 1 piloto. La tragedio vekis grandegan ĉagrenon en la tuta mondo.
La Papo komence de la aŭdienco ĝenerala en la sama tago diris:

« Vi scias, ke finis en tragedio kaj tre doloriga masakro la epizodo de la israelaj atletoj kaj de la arabaj teroristoj venintaj por perforta atako. Ni bedaŭras tiun ĉi agon, kiu vere malhonoras nian tempon; agon, kiu okazis en loko, kie oni celebris la internacian fratecon. Antaŭ ĉi tiuj mortintoj ni ne povas ne esti tre malĝojaj, ne esprimi nian konfuzon kaj nian fortegan bedaŭron. Kiuj estis la kaŭzoj? Ankaŭ tio maltrankviligas nin. Kiam oni vidas tiajn agadojn, oni devas pensi, ke granda malkvieteco kaj malamo estas en la animoj, kiuj fariĝas blindaj kaj alvenas al tiaj eksplodoj de perforto.

La spektatoroj — multe da milionoj — estas konfuzaj kaj vunditaj en sia spirito pro tiu ĉi absurda krimo. Kaj ni esperas, ke oni ne ripetos similajn agojn, sed tio estas timenda, ĉar malamo produktas malamon, la sango volas sangon, la venĝo venĝon. » Je la fino la Papo rekomendis la bonecon, la pardonon, la fratecon.
La timo de la Papo kaj de multaj aliaj estis tro bone fundata. La venĝo de Israelo ne malfruis. La 10-an de septembro dum la dimanĉa parolado Paŭlo VI diris: « La okazintaĵoj de ĉi tiuj tagoj frapis nin ĉiujn per morala traŭmo kaj konfuziganta surprizo. Krome ni estas malĝojaj pro la konfliktoj en Vietnamo kaj Irlando kaj pro la organizita krimeco, kiu disvastiĝas tra la civila mondo, korodas kaj malnobligas ĝin ».
La Papo invitis la fidelulojn serĉi en la preĝo la serenecon kaj la konfidon, poste li aldonis: « Sen justeco oni ne konstruas veran ekvilibron, veran kaj daŭran konkordon inter la nacioj kaj la sociaj klasoj... La venĝo ne estas rimedo, sed malbono, kiu facile estas ripetata kaj kreskas. La terorismo ne estas inda de homoj civilaj kaj kuraĝaj, frapas senkulpulojn kaj detruas la konfidon je paca kunvivo.
La milito ne solvas kaj hodiaŭ povas fariĝi daŭra kaj progresa; la parolo sincera kaj saĝa devas esti la preferenda metodo por la solvo de la problemoj kaj malkonkordoj, kune kun la justeco, la kompromiso, la gradanimeco, la pardono, la respekto al alies honoro ».
La dudeka olimpiado finis la 11-an de septembro. Domaĝe ke tiu bonege organizita kunveno estis makulita de neforgesebla tragedio!

SEM FRONTEIRAS. Aperis en Brazilo nova pormisia revuo nomata

« Sem Fronteiras (= sen nacilimoj) »: ĝi celas esti instrumento de evangelizado kaj de reviviglo de misia konscienco. En la unua artikolo oni legas:
« Brazilo, kiu nun estas misia lando, devas fariĝi misiista lando ».
PAŬLO VI en UDINE. En Udine okazis de la 10-a ĝis la 17-a de septembro la 18-a nacia Eŭkaristia Kongreso sub la prezido de Kard. Poma, ĉefepiskopo de Bologna kaj prezidanto de CEI (= Conferenza Episcopale Italiana).
La 16-an de septembro Udine (Norditalujo) havis la honoron havi kiel gaston la Papon, kiu celebris la Meson en la granda placo « Primo Maggio ». En la sama mateno Paŭlo VI faris mallongan viziton al Venecio (Venezia): li estas la kvara papo, kiu vizitis Venecion, post Aleksandro III, Pio VI kaj Pio VII (kiu estis elektita papo en Venecio). Ĉiuj scias, ke Pio X, protektanto de la katolikaj esperantistoj, estis patriarko de Venecio.

KRUCA VOJO EN NORDA POLLANDO

Ĉiujare printempe el ĉiuj urboj kaj pli grandaj vilaĝoj de pitoreska Kaŝuba Svisujo en Norda Pollando pilgrimas miloj da homoj en multnombraj grupoj al Vejherovo — Wejherowo —. En tiu urbo sur alta monto Kalvario ĉe torento Cedron estas pli ol tridek kapeletoj dediĉitaj al diversaj eroj de la Kruca Vojo de Kristo. Ilin la homamasoj vizitas por komune preĝi kaj mediti la celon de la alveno kaj suferado de Kristo kaj kion tio devigas veran kristanon.
Venontjare de la 1-a ĝis la 3-a de junio 1973, kadre de ordinara pilgrimgrupo iranta de Kartuzy al Vejherovo, pilgrimos ankaŭ esperantistoj por komune preĝi, kanti kaj mediti Dian Vorton. La trako kondukas laŭ 45 kilometra vojo tra pitoreska Kaŝubio.
Ni kore invitas partopreni la E-pilgrimadon diverskonfesiajn kristanojn el Pollando kaj el aliaj landoj. Aliĝu tuj! Instigu aliajn partopreni! Informojn sendas. Andrzej Marszalkowski, Kartuzy — Kaŝubio —, poŝtfako 19, Pollando.

A. Marszalkowski

Antaŭ serena suferado la feliĉulo devus ruĝiĝi. **Sertillanges**

Vi, malsanulo, ne estas seka kaj senfrukta arbo, terbulo sen tritiko, nekapabla laboristo. En nia vinberejo estas neniu pli bona laboristo ol la malsanulo, kiu preĝas kaj suferas serene. **Lyonnet**

LA EVANGELIO NE ESTAS DORMIGILO

La Evangelio ne estas dormigilo, sed dinamito. Rigardu vian horloĝon. Ĉimomente mortas miloj da homoj. Aliaj miloj suferas, alie, en malsanulejoj. Ĉimomente ĉe la bordoj de la Sejno aŭ de alia rivero aŭ alie virinoj malesperaj volas sinmortigi. En oriento dekoj da miloj fuĝas. Alie multaj miloj da homoj estas en la koncentrejoj.
Tio ĉi dum tiuj ĉi mallongaj momentoj. Kaj mi devus al vi diri: « kara sinjorino, mi bondeziras al vi bonan nokton ? ». Ne, se vi nenion faris por helpi viajn fratojn, mi diras al Vi: « malbonan nokton, maltrankvilan nokton! ».

Patro Leppich

LEGANTOJ SKRIBAS

E. Paesmans (Belgujo):

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis la viziton de Patro Christiaens, misiisto, kiu partoprenis la kongreson en Como. Li estis tre entuziasma pri ĉio kaj li estas certa, ke la katolika E-movado progresos.

P. Scherer (Svislando):

La Kongreso plaĉis al mi precipe pro tio, ke estis familieca atmosfero. Tio devenas de la fakto, ke la partoprenantoj estis malmultaj, kio aliflanke estas bedaŭrinda.

G. Drago (Jugoslavujo):

En EK (N. 7-8) troviĝas interesa « Lingva angulo ». La lingvaj spertoj de P. L. Kiŝ povus esti tre utilaj por la legantoj. Mi deziras lian daŭran helpon.

E. Vanneau (Francujo):

Tre est. Prezidanto! Memorante pri tiu bela Kongreso en Como, mi devas danki al vi kaj al ĉiuj organizintoj. Vi aranĝis ĉion vere kontentige, ni estis afable akceptitaj ĉie. La propagando por Esperanto okaze de niaj renkontiĝoj konigis nian movadon kaj agadon kaj certe pligrandigos la nombron de niaj amikoj.

P. Lovro Kiŝ (Jugoslavujo):

Pro la salutoj senditaj al mi el la IKUE-Kongreso en Como al vi kaj al aliaj mi kore dankas kaj mi esperas, ke la Kongreso faris bonajn decidojn.

Jozefo Zasas (Usono):

Mi deziras, ke katolikaj esperantistoj faru grandan revuon, imponan kaj riĉenhavan. Por ke ĝi tia estu, unue oni devas havi monojn. Sed nur monoj ne sufiĉas: oni devas fari ĝin tre interesa. Ĝi devus esti minimume 24-paĝa kaj havi jenajn ĉapitrojn: Oficialaj anoncoj de la Estraro — Raporto pri esperanta vivo kaj pri agado de katolikaj esperantistoj — Legantoj skribas — Nuntempaj problemoj de la katolika vivo — Voĉo de la Papo, instruo de la Eklezio. Ne devus esti ĉiuj artikoloj samopiniaj, alie la revuo estus unuflanka.

Malgranda noto. Estas tre facile uzi la vorton « interesa »; sed la redakcio bone scias, ke la interesoj aŭ deziroj aŭ gustoj estas tre diversaj kaj plurfoje kontrastantaj. Ni klopodas fari ĉion eblan por kontentigi almenaŭ la plimulton. Se la bonvolo de nia asocio helpos, ni povos fari la revuon ankaŭ pli granda.

Manuel Angel (Kolombio):

Kara Prezidanto! Mi salutas vin kun estimo. Mi multe interesiĝas pri via revuo Espero Katolika. Sendube ĝi estas bela kaj interesa revuo. Nia Esperanto-Klubo, fondita je la 24-a de septembro 1970, komencas E-kurson venontsemajne por komencantaj profesoroj kaj gefakestroj en nia urbo. Ĉu ni povas uzi vian revuon por la instruado de la internacia lingvo? Mi estas fakestro de idiomoj ĉe la Universitato Pontifika Bolivariana, Medellin, Kolombio.

Noto de la redakcio: Ni estas tre dankemaj al S-ro Angel, prezidanto de EKM (Esperanto-Klubo Medellín) kaj ĝojas, ke li volas uzi nian revuon por la instruado de la internacia lingvo.

Kondor (Germanujo):

Kelkfoje venas al mi la revuo « Popola Ĉinio », riĉenhava, tre bone zorgata; mi pensas, ke la filoj de la mallumo, kiel diras la Evangelio, estas pli agemaj kaj pli sagacaj ol la filoj de la lumo.

Noto de la redaktoro: Jes, multfoje la filoj de la mallumo propagandas siajn ideojn pli fervore ol ni. Tie la ŝtato elspezas multe por la propagando, pagas kapablajn homojn, kiuj povas sin tute dediĉi al la propagando. En nia asocio ni havas tre malmulte da personoj, kiuj helpas. Ĉiuj havas aliajn laborojn kaj dediĉas al nia afero nur mallongan tempon; en la malproksima presejo neniu presisto konas Esperanton. Nia internacia revuo devas resti 16-paĝa kaj vivi inter timoj kaj esperoj.

Thiollière (Francujo):

Nun mi ŝatas legi EK kaj sendi ekzemplerojn al niaj samideanoj, kiuj ne povas ricevi ĝin rekte. Laŭ mia opinio oni ne plu trovas bedaŭ-rindajn artikolojn kiel dum ĉi lastaj jaroj. Certe oni povas deziri aliajn

interesajn kiuj ne ankoraŭ estas; sed mi konas la malfacilaĵojn de la redaktoroj, ĉar mi estis dum kelkaj jaroj post la milito direktoro de ĉiutaga ĵurnalo.

Mi bedaŭras, ke mi ne povis iri al Como por la IKUE-kongreso.

Mi ricevas revuon de finnaj ortodoksaj kristanoj: mi sendas al vi ĝin, eble vi povos ĝin utiligi.

Noto de la redaktoro. Mi dankas nian samideanon. Thiollière pro lia afabla letero kaj pro la bela revueto. La redakcio klopodas aperigi interesajn artikolojn, sed ne estas eble kontentigi ĉiujn. Ankaŭ la malgrando de nia revuo limigas niajn eblecojn.

Estimata, ŝatata kaj tre kara nia redaktoro!

Antaŭ kelkaj tagoj mi sukcese ricevis de miaj eksterlandaj gefratoj plurajn EK-numerojn. Tre mi ĝojegas pro tio, ĉar en ili mi trovis multajn valorajn artikolojn. Mallonge, la enhavo estas laŭ mia opinio tre interesa kaj por ni, ĉeĥoslovakaj ikue-anoj bona spirita nutraĵo ĉiam sopiratendata. Kvankam la amassendaĵoj de EK-revuoj plu ne estas riceveblaj tamen dank, al Dio ni povas ricevadi aparte senditajn EK-revuojn. Ne nur la artikoloj estas interesaj, sed kun intereso mi ĉiam legadas ankaŭ la rubrikon « La legantoj skribas ». Estas vere bone, ke la legantoj havas ĉi tiun sian rubrikon, kie oni povas publikigi siajn opiniojn. Kompreneble ne ĉiuj samopinias, sed tre ĝojigis min, ke la skribantoj respektas siajn proksimulojn, ke malaperis el la paĝoj de EK la senfrukta disputado. Eĉ la lingva nivelo ĉiam pliboniĝas. Mi deziras al la kara EK-redaktoro multajn gracojn de Sankta Spirito, por ke EK restu almenaŭ samvalora kiel nun.

En EK n-ro 4 en mia artikolo « Kion vi faris... » mi menciis pruntericevon de nunjaraj numeroj de EK. Kun ĝojo mi sciigas al vi, karaj gefratoj, ke la artikolo donis siajn tre bonajn rezultojn. Mi ne plu devas pruntericevadi EK de nia sekci-prezidanto, sed mi povas dank' al niaj karaj ikue-anoj legi la proprajn EK-revuojn kaj ilin prunte-donadi ankaŭ al aliaj miaj gefratoj, kiuj ne havas la eblecon EK ricevadi. Tutkoran dankon mi sendas al vi, miaj karaj bonfarantoj.

Ĝuste por vi validas la vortoj de nia kara Jesuo: « Kion vi faris al unu el miaj fratoj la plej malgrandaj, tion vi faris al mi » Mat. 25,40. Bona Dio elaŭdis mian peton kaj donis al mi vin, karajn gefratojn, por ke vi helpu al mi eduki la infanojn.

Belegajn, tre valorajn porinfanajn religilibrojn mi ricevis precipe el

Italio, kiuj fariĝis fonto de la eterna vivo, el kiu ĉerpos miaj infanoj. Kara nia sinjoro redaktoro, bona Dio donu al vi forton kaj benon, por ke vi ĉiam sukcese redaktu nian karan revuon.
Kun koraj kaj frataj salutoj restas via frato en Jesuo Kristo.

Miloslav Ŝváĉek

« MIELA LUNO EN RIMINI 1972 »

Ankaŭ nunjare tre bone sukcesis la konkurso por junaj geedzaj paroj jam de kelkaj jaroj organizita de la turisma entrepreno kaj de la asocio de la Hotelestroj en Rimini.
El diversaj Eŭropaj landoj venis al Rimini 42 paroj kaj ĝuis senpagan restadon en unuaklasa hotelo de la 1a ĝis la 8a de la kuranta junio La programo estis vere interesa: ekskurso al San Leo kaj Sanmarino, vizito al « miniItalujo » en Viserba, dancvespero, fotokonkurso por la edzoj, konkurso pri florarangô (ikebana) por la edzinoj, « gran gala » ĉe Grand Hotel, ktp.
La esperantistaj paroj estis: Janina kaj Wouter Frank Pilger (li nederlandano, ŝi polino), Sylva kaj Pavel Polnicky el Ĉekoslovakujo, Eva kaj Marian Dobrzynski el Varsovio. Bedaŭrinde, la kvara premiita polgermana esperantista paro, Margareta kaj Stanislavo Rynduch, lastmomente informis, ke neeblas alveni al Rimini.
Oficiala akompanantino de la esperantistaj paroj estis S.ino Ada Fi-

La esperantistaj paroj akceptitaj ĉe la urbestro de Rimini. De maldekstre: Marian, W. Frank, Janina, prof. N. Pagliarani, Eva, Sylva, Pavel kaj p. A. Ciccanti.

ghiera-Sikorska, redaktoro de « Heroldo de Esperanto ».
Aldone al la oficiala programo, por la esperantistaj paroj oni aranĝis viziton al Riccione kun akcepto ĉe la prezidanto de la loka turisma entrepreno prof. Geo Cenci kaj al Cesena kun akcepto ĉe la loka esperanto-grupo.
Dimanĉe, la 4an de junio, por la esperantistaj paroj kaj lokaj gesamideanoj, p. Albino Ciccanti celebris S. Meson en esperanto en la kapelo de la Salesianoj en Rimini.

NIN PLIRIĈIGIS TIO, KION NI KUN AMO FARIS KAJ DONIS

Jen, la ŝatata proverbo de nia amata iniciatinto de E-tendaro en Herbortice — Ĉeĥoslovakio — sacerdoto Xaver. Tiu ĉi proverbo profunde enradikiĝis en mia koro jam antaŭ kelkaj jaroj. Kaj ne nur en mia koro ĝi trovis sian lokon. Kelkaj miaj oferemaj kunlaborantoj — ikue-anoj helpis al mi prepari kaj precipe kunorganizi la nunjaran, jam la kvaran Libertempan E-tendaro en montara vilaĝeto Herbortice.

Kia estis ĝia rezulto? Grandan paŝon antaŭen ni faris survoje al niaj idealoj. La esenco de esperantistaj idealoj estas sendube amo, same kiel de la kristanaj idealoj. Kaj la amo, la vera proksimula amo regis en nia nunjara LET, kiel cetere ĉiujare. Sed nunjare tiu ĉi viviganta forto trapenetris fakte ĉiun partopreninton. Ĉiu tago, ĉiu tagparto estis riĉa je ĉi tiu produkto de Sankta Spirito. Ĉiumomente estis ebleco disdonadi amon per reciproka kunhelpado aŭ almenaŭ pere de afabla vorto, konsilo, konsolo aŭ ĝojiga ekrideto. Tiu ĉi frateca etoso regis ek de la komenco ĝis la fino de la restado.

La celo de ĉi tiu aranĝo estis ne nur anima refreŝiĝo, sed ankaŭ pliperfektiĝo de nia lingva nivelo. Por ĉi celo okazis kursoj de Esperanto por komencantoj, progresantoj kaj la konversacia kurso. Tre populara estis la kurso de nia hungara frato Lajos Csépai el Budapeŝto, kies koro tute alkreskis al nia LET.

Sed la celo ne estis nur nia reciproka pliriĉiĝo. La bonaj amikaj rilatoj kun la apudtendara loĝantaro estas ankaŭ nia ĉiujara celo. Por doni al la montaranoj iom da nia ĝojo, kun amo ĉiuj tendaranoj ĉiutage preparadis tutvesperan estradprogramon: « Per E-kantoj tra la mondo ». La sukcesa estrado postlasis ĉe la loĝantaro multajn agrablajn impresojn kaj ĉe la tendaranoj senton de bona faro kaj de neentrudiga propagando de niaj idealoj. Domaĝe, ke krom gefratoj el Litovio kaj Hungario venis

nunjare neniu alia ikue-ano el eksterlando, por travivi por sia vivo vere neforgeseblajn ĝojmomentojn.

Post tiel belege travivitaj du semajnoj la partoprenintoj povas kun kontento diri: « Nin pliriĉigis tio, kion ni kun amo faris kaj disdonis ».

Miloslav Ŝváĉek

LINGVA ANGULO

Jesuo aŭ Jezuo?

S-ano J. T. malprave asertas, ke la hebrea, greka kaj latina lingvoj skribas Jesuo anstataŭ kiel mi Jezuo. Kiel oni ĝuste parolas kaj skribas « muziko »? ĉu ekzistas p. 9 de la FDE kaj ĉu ĝi estas obeenda? ĉu nia gramatiko konas escepton? ĉu iu rajtas kaprice fari ŝanĝojn? Kiuj esperantistoj estas la plej fidelaj Zamenhofanoj?

D-ro Adolf Halbedl

Rivelo aŭ revelacio?

Laŭ la Plena Vortaro la termino RIVELO apartenas unue al fotografia fako, ĉar PV deklaras la vorton tiel: riveli = aperigi per specialaj ĥemiaj banoj la latentan bildon (negativon) sur la impresita tavolo de plako aŭ papero. Tamen en la Suplemento PV allasas ankaŭ riveli por revelacii. Pri REVELACIO la PV diras: Inspiro per kiu Dio sciigas al homo pri siaj misteroj aŭ voloj. Do pli bone respondas la vorto REVELACIO ol la vorto RIVELO.

P. Lovro Kiŝ

De la « *FRANCA KATOLIKA ESPERANTO - ASOCIO* » ni ricevas:

La kongreso de la FKEA kunveninta en St. Germain-en-Laye la 29-an de aprilo 1972:

konstatinte la nunan iompostioman malaperon de la latina lingvo en la pastraj seminarioj kaj la sekvajn grandiĝantajn lingvajn malfacilaĵojn en la katolika Eklezio;

konstatinte, ke la internacia lingvo Esperanto estas nun regule uzata en la liturgio de la katolikaj Esperanto-renkontoj, proponas: ke la katolikaj instancoj konsideru la eventualan enkondukon de Esperanto en la pastrajn seminariojn, samrange kiel aliaj lingvoj;

ke Radio-Vatikano, kiu jam uzas aliajn lingvojn, enkonduku ankaŭ Esperanton en siajn programojn.

Colas René-Claude (Prezidanto)

ANGLA LINGVO KAJ ESPERANTO
(El « The British Esperantist » (Aug. 1972)

La organo de BEA (= British Esperanto Association) publikigis interesan paroladon de la Prezidanto Grahame Leon Smith: ni volonte elĉerpas ĝies parton.

« Tiu ĉi jaro estas nia jaro, ĉar la Komuna Merkato baldaŭ diskrevigos la miton. Jam en Bruselo la traduklaboroj por la Seso postlamas de du jaroj. Kiel estos, kiam oni devos lukti kun ok aŭ naŭ lingvoj?

La unuan pafon ĵetis s-ro Lynch, la irlanda ĉefministro, kiam li insiste parolis la gaelan en la aliĝa ceremonio de la Komuna Merkato, anstataŭ paroli angle. Se li estis preta fordoni la suverenecon en tiu grado, kiun la Traktato de Romo postulas, li tamen volis klare montri, ke iujn ajn aferojn nacio ne volas fordoni, inter kiuj sian lingvon.

Eble la E-movado devus konsideri la eblecon doni premion ĉiujare al tiuj, kiuj plej multe helpis la aferon. S-ro Lynch certe kvalifikiĝis por tia premio. Alian premion mi rekomendus por S-ro Pompidou pro lia publika rezoluteco neniam paroli la anglan.

Trian mi proponus al S-ro Heath pro lia provo paroli la francan. Lia televidigita klopodo paroli la francan elvokis elkoran ridegon same en Francujo kiel en Britujo.

Sed ni memoru la signifon de tiu incidento. S-ro Heath estis kapabla lernanto en la gimnazio kaj tie li studis la francan dum kvar jaroj. Li konfesas, ke li ne povas konversacii en la franca; kaj kiam li alparolas la francojn en tio, kion li supozas ilia lingvo, ili ne povas ne ridi.

Ĉu do ni prenu en konsideron la eblecon, ke dujaraj kursoj de la angla lingvo en eksterlando iam povos prezenti praktikan solvon de la lingva problemo?

Se S-ro Heath ne povas lerni la francan en kvar jaroj, kiel la ordinara homo povus sukcesi en la duono de tiu tempo? Li neniam, eĉ per dudek jaroj da studado, lernos la anglan ĝis tiu punkto, kie nacio povas paroli al nacio. Nacio estas popolo, ordinara popolo. Ĉiam estis evidente, ke la instruado de la angla aŭ de la franca en la lernejoj ne povas solvi la lingvan problemon. Tio, kio igas la venontan jaron tiel grava, estas ke tiu fakto estos demonstrata.

Samtempe la granda disvastiĝo de la ideo instrui Esperanton en la lernejoj dum unu jaro demonstros, ke ordinaraj homoj povas paroli unu al alia sen forcedo de propra nacia identeco aŭ kulturo, sen avantaĝigo de unu grupo uzanta sian gepatran lingvon. La sola vera rimedo de interkomunikado estas Esperanto.

PORTRETO DE ALBERTO EIITI MINAMI
JAPANA REPREZENTANTO DE I.K.U.E.

Katolikismo, Esperantismo kaj Scienco havas internacian karakteron, kaj en kies kruciĝo mi vidas lian personecon. Li skribas, ke tri hebreoj montriĝas al li gvidantoj de lia vivo: Nia Sinjoro, Nia Majstro kaj V. M. Goldschmidt. Tiu ĉi lasta gvidis lin pri geokemio ĉe la Universitato de Göttingen.

Li naskiĝis en 1899, eklernis Esperanton en 1910-aj jaroj. Novan Testamenton en Esperanto li legis unue 1919. Suferoj dum lia juneco igis lin legi religiajn librojn, precipe influis lin verkoj de C. Hilty, sviso, « Progreso de la Pilgrimanto » de J. Bunyan, anglo. Li diris impreson pri la lasta, ke angla originalo estis lingve malfacila, japana traduko estis stile malglata tial li preferis ripetade legi Esperantan tradukon kun granda emocio.

Dum lia studo en Germanujo, 1933-5, li vojaĝis Italujon, kie li vidis heredaĵojn de Katolika Eklezio, ekz-e, Bazilikon de S. Petro, Katakombojn kaj aliajn. Poste en lia hejmlando li legis Esperantan tradukon de « Fabiola, rakonto pri katakomboj » de Kardinalo Wiseman, anglo. La enhavo revivigis al li la rememorojn de Katakomboj.

Sur tiu ĉi substrato li pli proksimigis sin al Katolikismo, en 1942 li ricevis bapton. Lia baptnomo devenas de Alberto Granda, patrono de natursciencistoj: lia fako, analiza kemio, minerala kemio kaj geokemio. Estas tre malfacile komprenigi legantojn ke kristana baptiĝo en tiamaj epoko kaj socio necesigis al baptatoj eksterordinaran kuraĝon.

En 1949 fondiĝis Katolika Asocio de Japanaj Esperantistoj kun celo propagandi Esperanton al katolikoj, katolikismon al esperantistoj. Li fervore kunlaboris kiel komitatano. Poste li prenis sur sin la rolon de nuna posteno kaj perfekte plenumas ĝin, dume li redaktas « Leviĝanta Suno », organon de japana filio de IKUE, ek de 1962.

Grandan dankemon al lia longedaŭra kaj multplena laboro por nia movado. Dio donu al li plimulton da feliĉaj jaroj.

Skizis: Anselmo Matubara-Hatirô
nova reprezentanto

La vero estas kiel altega monto. Dum oni supreniras, oni vidas antaŭ si nur nudan rokon, sed kiam oni atingas la pinton, aperas mirindaj panoramoj.

Bernardin de S. Pierre

La ĝojo estas la parfumo de Dio sentata en nia animo. **E. Hello**

LIBRO-SERVO DE IKUE

Antaŭ mallonga tempo aperis katolika terminaro Nederlands-Esperanto de H. Roosen S. C. J. kaj H. G. Wannemakers S. J.
La enhavo estas riĉa. Oni devas ŝati la longan kaj utilan laboron de ambaŭ aŭtoroj. La nova terminaro formas kun aliaj belan kolekton, kiu helpas ĉiujn, kiuj redaktas artikolojn pri religiaj temoj.
Inter aliaj ni memoras ĉi tiujn katolikajn terminarojn:
Deutsch-Esperanto de W. Flammer, Esperanto-Latine de Wannemakers kaj Huberteno, Esperanto-Français de J. B. Boulmer, Italiano-Esperanto de G. Jacobitti, Esperanto-Espanol de J. M. Claramunt.
Mendu ĉe la Libro-Servo de IKUE:
S-ino A. M. Sinnema-de Vetten, Oostdorpenweg 88,
Wassenaar (Nederlando), poŝtk. 62 14 90.
Tie oni povas mendi aliajn utilajn librojn: papajn enciklikojn, deklarojn de la Dua Vatikana Koncilo kaj aliajn dokumentojn.

DELEGACIO DE FERVOJISTOJ-ESPERANTISTOJ AKCEPTITA ĈE ITALA MINISTERIO

Sekve de kelkaj ŝanĝoj en la konsisto de la itala registaro, fine de pasinta februaro denove fariĝis Ministro pri transportoj kaj civila aviado Hon. Oscar Luigi Scalfaro. Tio havas apartan intereson por la esperantistoj, ĉar deputito Scalfaro, cetere fervora eŭropisto kaj larĝmense malfermita al la novaj postuloj de internacia kunlaboro, tre favore kondutis koncerne esperanton okaze de antaŭa periodo de funkciado kiel Ministro pri Transportoj; en la jaro 1968-a, fakte, estis ĝuste li, kiu, forigante la obstaklojn kaj la dubojn de kelkaj administraj oficejoj, ordonis, ke **en la itala Fervoja horar-libro la ĝeneralaj klarigoj estu ankaŭ en Esperanto.** Post tiu unua paŝo, aliaj rekonoj venis al la internacia lingvo en la transporta kaj precipe fervojista medio; **ni nur menciu la esperantlingvan broŝuron « En Italujo por viaj rendevuoj kun la suno »,** oficiale eldonitan de la Italaj Ŝtatfervojoj, la efikan subtenon de la samaj Ŝtatfervojoj okaze de la 22-a IFEA-Kongreso en Rimini, kaj la oficialan cirkuleron de la Kultura kaj Sociala instanco de la Italaj Ŝtatfervojoj per kiu oni invitis la lokajn sekcioyn favori la instruadon de la Internacia Lingvo.
Profitante la okazon de la denova ministreco de Hon. Scalfaro, la italaj esperantistaj fervojistoj intencas fari demarŝojn cele al plifirmigo de la pozicio de **la internacia lingvo en la transporta sektoro:** ekzemple, oni petis, ke estu tradukataj al Eperanto ankaŭ la klarigoj de la oficiala broŝuro pri rezervigo de lokoj en la trajnoj, ke oni faru duan eldonon de la menciita (kaj jam elĉerpita) propaganda broŝuro « En Italujo por viaj rendevuoj kun la sumo », ke oni donu libertempon ekster la ordinarajn feriojn al la partoprenantoj en la fervojistaj esperanto-kongresoj, kaj ĝenerale, ke pliintensiĝu la kunlaborado inter la Italaj Fervojoj kaj la E-movado.

ASPEKTOJ DE LA MALJUSTECO

La Episkopa Sinodo parolis pri la maljusteco en la mondo kaj konsideris ĝies aspektojn politikajn, kulturajn kaj ekonomiajn.
Sur la politika kampo la episkopoj malaprobis la egemonion de malmultaj fortegaj ŝtatoj, kiuj praktike determinas la vivon kaj la civilan disvolviĝon de multaj dependaj ŝtatetoj (satelitoj).
La plej seriozaj konsekvencoj de tiu ĉi politika egemonio estas: la fakta negacio de la rajto, kiun la popoloj havas je la disvolviĝo kaj partoprenado; la kurado al la armiloj; la neniam estingitaj fajrejoj de milito kaj lukto; la subpremoj, torturoj, malamo ktp. Koncerne la maljustaĵojn sur la kultura kampo la sinodaj Patroj notas, ke multaj popoloj sur la vojo de la disvolviĝo devas rezigni sian kulturan propraĵon, ofte nur por ĝuj la necesajn helpojn, kiujn la riĉaj ŝtatoj oferas sub maldecaj kondiĉoj. Tial la Patroj jesas la rajton de la popoloj konservi sian identecon kaj admonas ilin havi iom da respondeca naciemeco, kiu helpas ilin atingi kaj konservi sian identecon.
La Sinodo konsideras kelkajn grandegajn maljustaĵojn, kiujn la kultura egemonio ĉie produktas: precipe la rasajn kaj popolajn diferencigojn kaj la religiajn persekutadojn.
« Oni devas bedaŭri precipe la kondiĉojn de multaj miloj da rifuĝintoj, de klasoj kaj popoloj persekutataj pro ilia rasa aŭ popola deveno aŭ pro tribaj motivoj ». (N. 21).
« En multaj landoj oni ofendas la justecon tre grave, ĉar multaj suferas persekutojn pro sia religia kredo aŭ subpremantan ateistan agadon flanke de politikaj partioj aŭ reĝimoj aŭ oni senigas ilin je la religia libereco: oni malpermesas ke ili honoru Dion per publika kulto aŭ instruu kaj propagu sian fidon aŭ ekzercu civilan agadon laŭ la principoj de sia religio ». (N. 22).
Poste la Sinodo pritraktis la ekonomian aspekton de la maljusteco. Grandaj maljustaĵoj manifestiĝas antaŭ ĉio en la organizado de la ekonomio, kiu « favoras la koncentriĝon de la riĉaĵoj kaj de la povo en la manojn de malgranda grupo, publika aŭ privata, da regantoj. La ekonomia maljusteco kaj la manko de socia partopreno malhelpas la fundamentajn rajtoyn homajn kaj civilajn » (N. 9).
Sed la maljustaĵoj de la nuna ekonomia sistemo aperas pli klare en la internaciaj rilatoj, kie la malegala distribuo estas skandala: « unu triono de la homaro decidas pri tri kvaronoj de enspezoj, investoj kaj komerco ». (N. 12).
ELEKTOJ. La sinodaj Patroj proponis kvar elektojn, kiuj pro la konsulta karaktero de la Sinodo estas kvar sugestoj al la Papo.
Unua elekto: la Eklezio intencas fariĝi ekzemplo de justeco, ekzamenante sian internan vivon. Oni devas ekzameni kiel estas administrataj la ekleziaj propraĵoj. Oni devas ekzerci la justecon kun la dependaj personoj (religiuloj kaj laikoj), kiuj laboras en ekleziaj institucioj.
Oni ekzamenu la vivmanieron de la ekleziuloj, por ke ili donu al la aliaj la ekzemplon de tiu modereco, kiun ili predikas.
La Eklezio garantiu en sia interna vivo la rajton de ĉiuj aĵ deca libereco en la esprimo de ideoj kaj legitiman diversecon en la dialogo.
Dum la procesoj oni garantiu al la imputito la rajton koni siajn akuzantojn.
Due elekto: la Eklezio intencas uzi sian moralan forton por promocii agadon je internacia nivelo, kiu movu la respondeculoj al efektiva transformo de la politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj rilatoj inter la popoloj.
La Eklezio subtenu ageme la internaciajn organojn kaj iliajn iniciatojn; kontribuu al la formiĝo de nova mentaleco kaj de nova vido de la societo; memorigu la devon de la modereco en la uzo de la bienoj, kiu apartenas al ĉiuj.

Tria elekto: la Eklezio volas promocii kulturan dialogon kun ĉiuj bonvolaj homoj. Kelkaj vojoj: la ekumena kunlaboro kun ĉiuj disiĝintaj fratoj por defendi la dignecon de la homo kaj liajn fundamentajn rajtojn; serioza klopodo por eduki kaj fari sentemaj la konsciencojn.
Kvara elekto: la Eklezio volas esti kun la malriĉuloj, fariĝi voĉo « de ĉiuj, kiuj ne havas voĉon» kaj ne estas aŭskultataj
La Eklezio ne havas la taskon doni konkretajn solvojn por realigi la justecon sur socia, ekonomia kaj politika kampoj, tamen ĝi defendas kaj promocias la dignecon kaj la rajtojn de la homo.
Por plenumi sian mision ĝi devas — laŭ la Sinodo — denunci prudente kaj karite, sed kuraĝe kaj sincere la maljustaĵojn en la mondo (N. 59). La laikoj devas entrepreni konkretajn iniciatojn.
La Patroj lasis al la konscienco de la kristanaj laikoj la respondecon serĉi kaj decidi.
Je la fino de tiu ĉi panoramo de la laborado sur la kampo de la justeco, estas klaraj la precipaj logikaj momentoj, kiuj orientis la diskutadon de la sinodaj Patroj, kaj la plej signifaj rezultatoj.
La temo estas tre vasta kaj komplikata, sed ni devas ŝati la gravecon de la sinoda dokumento

---

VENTO POR NIA MUELILO

Patra bataladfesteno estis lingva miskompreno. Vere okazis en holanda urbo kun italo (sed estis povinta okazi en ĉiu lando kun ĉiu ekstelandano), sed jen la historio:
Bruno P., fortstatura italo de Z. el H. de la polica juĝo estas kondamnita al puno de 50 guldenoj. La viro estis bonege batinta kiam lia knabo plorante al li estis rakontinta ke li estas batita de iu viro. Ne petinte ian detala klarigon (kion malhelpis la lingva bariero) Bruno estis sursaltinta la nukon de sro A., kaj tiam energie trabatinta... Ankaŭ la sepdekjara patro de A. ricevis okulon multkoloran.
Ke ĉio estis bazata sur miskompreno li tre bedaŭris... Ni ja bedaŭru ke « krimulo » kaj viktimo ne ambaŭ parolas la **pacan** kaj pacigan lingvon Esperanto.

"Lingva bariero kaŭzo de morto

Familiaj kuracistoj de la havenurbo Roterdamo ĝenerale pro la lingva bariero ne povas ĝuste kaj rapide pritrakti medicine la eksterlandajn gastajn laboristojn. La nederlanda asocio por Progreso de la Medicino kaj la roterdama Medicina Asocio eĉ atestas ke pro tio la antaŭan jaron gastaj laboristoj estas mortintaj ĉar oni ne povis fari ĝustatempan kaj ĝustan diagnozon .
Enketo inter la kuracistoj en Roterdamo sciigis, ke apenaŭ troviĝas familiaj kuracistoj kaj specialistoj kiuj povas paroli Turke, Arabe, Hispane aŭ Itale (limigante la plej gravajn grupojn de ekstelandanoj en Roterdamo). Laŭ la opinio ankaŭ de D-ro van Geuns la lingva bariero en la plej simpla taga medicinpraktiko ankaŭ por la gastlaboristoj liveras nevinkeblajn malfacilaĵojn.
« Vi nur imagu ke vi mem en Egiptujo havu tre malklarajn ventrajn dolorojn kaj ke vi venu ĉe kuracisto kiu apenaŭ komprenus vin ». Krome li ankaŭ estas surŝarĝita de plenplena atendejo. Tiu kuracisto tiukaze ne nur ne povas trovi ion, sed li

ankaŭ ne havas la ŝancon ekzameni ĉu la plendoj ne rezultas el strecĉiĝoj kaj de si mem malmulton signifas. Kaj ĉu la lingva malfacileco ne graviĝas de eblaj ne-honestecoj de vortoj, esprimoj, petoj en la oreloj de aliraciaj homoj?
El tio jam rezultis la decido de granda loka asocio por helpado al eksterlandaj laboristoj « Rijnmond » altiri (laŭ la ekz. de Yugoslavaj laborkuracistoj) medicistojn el eksterlando por iliaj propraj samlandanoj.

Karaj gelegantoj: ĉu tiaj faktoj ne parolas? pro tio sonas jam tiom da jaroj: do anoncu al suba adreso (eĉ se plaĉas nederl., germ., france, angle, itale, hispane) ĉion kio estas urĝa por nïa lingvo internacia. Jen la preciza adreso, kiun eĉ fidelaj amikoj ŝajne forgesis:
K. A. Ouwendijk, em/par Roelofarendsveen. Nederlando (Z. Holland)".

ESPERIGO

Amika al la junularo ankaŭ nuntempa, instruistino de knabinoj, volanta ne sole klerigi, sed ĉefe eduki, respondigis sennome al la demando, ĉu junaj homoj serĉas idealon. Ŝi ricevis multajn edifajn respondojn, el kiuj mi diskonigu nun kelkajn.
Mi ne trovis certan idealon. Mi tre ŝatas, observi la homojn, kaj kiam mi malkaŝas ies kvaliton, kiu al mi plaĉas, mi provas imiti tiun personon.
Mia modelo estas la gepatroj. Ili bone konsilas kaj kun ĉia problemo mi povas ilin aliri. Ili helpas en ĉiu situacio kaj bone solvas ĉiujn aferojn.
Propre mi ne havas idealon. Mi admiras la homojn, kiuj subtenas la pacon kaj justecon en nia mondo, kaj deziras ankaŭ esti tia.
Mi ne scias, ĉu Jezuon Kriston oni povas nomi idealo. Por mi li estas la unika, kiu min influas. Por mi li estas la lokomotivo de mia vivo.
Vera kristano estas por mi modelo, kvankam mi ne konas iun, kies vivmanieron mi nur imagas. Mi provadas vivi laŭ tiu modelo ĉar mi scias kaj ne nur kredas, ke en ĉiu krizo li ekinterilatas kun Dio kaj tial estas tre apogita. Tiel li ekkonas la sencon de la vivo. Sed pri tio mi ofte mem malsukcesas kaj vidas poste, ke ofte mi tro konsentas la influon de mia medio.
Mi ne havas idealon, kredante, ke neniu homo estas neriproĉebla. Mi vivas tiel, kiel mia konscienco permesas. kaj mi scias, ke mi povas fidi al mia konscienco.
Mia patrino estas mia idealo. Mi fariĝu same konscienca kaj bona, kiel estas ŝi. Por mi nenia kanzonisto povas esti idealo, ĉar oni konas ilin tro malsufiĉe. Sed mi ne volas diri, ke precize kiel aliaj knabinoj mi ne ŝatas modernajn muzikon kaj kanzonistojn.
Mi trovas, ke neniu homo posedas ĉiujn kvalitojn, por taŭgi kiel mia idealo. Por mi ne la homo mem estas idealo, sed tio estus kvalito lia, kiu min ravas. Nur Jezuo povas esti mia idealo, sed ĉi tion mi diros al neniu.
Jen malkaŝiĝis malsupraĵaj fluoj, kiuj kuraĝigas ĝuste tial, ke ili ekzistas ankaŭ nuntempe en mondo, kiu ŝajne tuta genuas antaŭ la « Ora Bovido ».
Nun estas tre pli kredinde, ke sanaj junhomoj rifuzas la produktojn de senhonta, monavida kaj morale pereiga industrio de pornografio. La 28.1.1972 aperis en la ĵurnalo « Kleine Zeitung », Graz, letero de klaso de la politeĥnika kurso por knabinoj en Graz-Süd sub la titolo: « Foren la senmoralaj gazetoj! », en kiu Renate FRIEDL por si kaj siaj koleginoj asertas, ke la pornografio estas unu el la plej gravaj problemoj de la nuntempo, kaj protestas kontraŭ la promonaj prostituadoj de junaj personoj kaj ties ekspluatado.

D-ro Halbedl